

ESPERANTO

★ TRIUMFONTA ★

N-ro 7 * 25. Okt. 1920

Jurnalo internacia, universala, sendependa
eldonata de Teo Jung, Köln-Horrem (Germ.)

Eliras provizore dufoje en la monato;
depost Novembro 1920 ĉiusemajne.

Esperanto en la Lernejoj.

Oficiala Dekreto de la Heslanda Instru-Ministro D-ro Strecker pri Instruado de Esperanto en la Heslandaj Lernejoj.

Plia Paŝo al la Celo.

La sudokcident-germana ŝtato Hessen estis ĝis antaŭ nelonge nur tuŝata de la Esperanto-movado, kaj malmultaj estis la fervoruloj arigitaj ĉirkaŭ la verda standardo, nek ĝenerataj, nek helpataj de oficialuloj. Plifavoriĝis la atmosfero post la milito. La politika kaj socia situacio vekis la komprenon por ilia celado, kaj en Worms la samideanoj sukcesis aranĝi dum la pasinta vintro kurson ĉe la Popola Altlernejo gviditan de mi. Tiu provo estis kuraĝiga kaj instigis min, peti de la *Landesamt für das Bildungswesen* la permeson al pri-esperanta instruado en mia klaso. Ricevinte tiun permeson, mi komencis fakultativan instruadon al 40 knaboj 14-jaraj. Ni estis plene kontentigitaj, sed kiu imagas nian surprizon, kiam tute ne atendite la Landesamt jenan dekreton:

Darmstadt, la 6-an de sept. 1920.

Hessisches Landesamt für das Bildungswesen.
(Hessen's Landa Oficejo por la Klerigaj Aferoj.)
Al N.L. f. d. B. S. 18477.

Koncernas: *Mondhelplingvon Esperanto.*

Al la direktoj de la pli altaj lernejoj,
la direktoj de la burĝaj lernejoj kaj
la distriktaĵaj lernejaj komisioj.

La interpopola interkompreniĝado estas treege malfaciligata per la diverseco de la lingvoj. La lernado de fremdaj lingvoj helpas nur al partumo de ĉiu popolo trans la ekzistantajn fendojn kaj ankaŭ tion nur al malmultaj unuopaj nacioj. Facile lernebla, unueca mondhelplingvo male kreus baldau fundon por ĝenerala kaj senpera interŝanĝo de ideoj inter ĉiuj popoloj de la tero. Nature ĝi neniam anstataŭos kaj ne celos anstataŭi la organe kreskitajn kultur-lingvojn. Sed ĝi povas fariĝi kaj devas fariĝi apud ili ĝenerala, unueca helpilo por la interkompreniĝo. En la estonto la celado al neŭtrala artefarita helplingvo ricevos ĉe ĉiuj internaciaj intertraktadoj — Ligo de la Nacioj, arbitracia tribunalo, kongreso — ankoraŭ apartan signifon en la rajta batalado kontraŭ la kulture, politike kaj ekonomie malfidinda superregado de unu el la ekzistantaj naturaj naciaj lingvoj. Ke la solvo de la problemo estas tre malfacila, tio ne estu ne-konsentata. Nin germanoj povas kuraĝigi, ke neniu el nia granda Leibniz starigis al la kulturhumoro tiun grandan problemon jam antaŭ du jarcentoj. Bone pripensita kaj tre facile lernebla kiel ankaŭ tute

belsona montriĝis la jam sufiĉe diskonigita Esperanto. Tial estas adresata al ĉiuj lernejoj de Heslando la postulo konstante, kiuj instruistoj kaj lernantoj jam estas okupiĝintaj pri Esperanto kaj, seeble aranĝi pliajn provojn pri fakultativa instruado pri-esperanta ĉie, kie kvalifikaj instru-personoj memvole estas emaj al tio kaj kie sin povas dediĉi al la lernado sen irosarĝiĝo lernantoj kun bonaj lingvaj kapabloj. Pri la intereso eventuale ekzistanta en instruistaj rondoj kaj pri la spertoj faritaj en la pri-esperanta instruado ni atendas raportojn al la „Landesamt für das Bildungswesen“ je la fino de la instrua jaro.

D-ro Strecker.

Vere, longjara propagandisto ne povus pli trafe pledi por nia ideala celado. Ankaŭ vaste trans la limo de Hessen konata kiel progresema politikisto kaj varmkora pedagogo, ministro d-ro Strecker jen sin malkaŝas kiel celscianta esperantisto: ĉar estis spirito de nia spirito, kiu dikis tiujn ĉi liniojn. Kun firma ekprenado li sidigis nian aferon en la selon: ĝi rajdos. Ni esperantistoj en Hessen ŝuldas al la nova altranga protektanto de nia afero profundan dankon. Lia iniciato ebenigas la vojon al sukcesplena agado. Sed ankaŭ eksterlande la ministra dekreto efikos. Samideanoj, diskonigu ĝin en viaj respektivaj landoj! Atentigu pri ĝi viajn registrojn! Ekzemploj tiras. Pli kaj pli larĝiĝas la breĉoj — la venko estos nia.

WORMS (Germ.) FRITZ PFAFF, del. UEA.
Seb. Münster Str. 12.

PIEDNOTO: Por povi montri al ministro d-ro Strecker, ke Esperanto estas ne nur sufiĉe, sed jam tre disvastiginta, mi petas pri represo de la dekreto en plejeble multaj esperantaj kaj nacilingvaj gazetoj kaj bonvola alsendo de po tri specimenoj. La koston mi, se dezirate, volonte kompensas.
Fr. Pf.

Novaj Kursoj en Anglaj Lernejoj.

Sub la aŭspicioj de la Eduka Komitato oni instruas en Sheffield la lingvon Esperanto marde kaj merkrede en Woodseats Council School (instruisto s-ro Bateman); vendrede en Central-Lernejo (instruisto s-ro E. T. Rodger).

La Esperanto-kurso en unu taglernejo en Liverpool komencita kiel eksperimento ĉe la komenco de ĉi-jaro tiel kontentigis la Edukadan Aŭtoritaton, ke ĝi nun donis permeson por daŭrigi la kurson. La kurso estos pligrandigota dum la venonta vintira semestro. La instruisto estas Thos. Rawlinson, Granton Rd., Council School, Liverpool, kien oni skribu por ĉiu plua informo kaj korespondado kun la knaboj.

Urba Esperanto-Lernejo en Saaz (Ĉeĥoslov.)

La Esperanto-penso en Saaz depost la informo parolado de prof. J. Süsser forte enradikiĝis. La urba Esperanto-lernejo, malfermita je la 15 septembro, estas multnombro vizitata el ĉiuj rondoj de la loĝantaro. Pavis esti malfermataj je unu fojo ses paralel-klasoj, en kiuj instruas la direktoro (prof. J. Süsser) kaj du instruistoj. 50 interesuloj devis esti esperigitaj por postaj kursoj. La intereso por E estas daŭre vigla kaj estas koncerne la estontan E-mond-kongreson (aŭgusto 1921 en Prago) ankoraŭ kreskanta. La unuaj kursoj finiĝos je Kristmasko. Poste fondo de loka grupo de UEA.

Dekreto de l' Bohema Instru-Ministro.

El „Esperanta Finnlando“ ni represas sekvan sciiĝon:

Laŭ peto de niaj ĉeĥoslovakaj samideanoj la ministro de instruado Habrman konsentis permesi instruadon de Esperanto kiel fakultativa fako en ĉiuj lernejoj, kie la instruistoj tion petas.

En Bulgaraj Lernejoj.

La komisiitaro, elektita de la reganta konsilantaro de la ligo de l' progimnaziaj kaj gimnaziaj instruistoj, laŭ la decido de la 14-a ordinaro kongreso, ellaboris projekton por reformado de la kleriga sistemo en Bulgariujo. Tiu ĉi projekto, publikigita en la instruista gazeto n-roj 17 kaj 18 de 1—15 de majo 1920, proponas enkondukon de la fakultativa ellernado de Esperanto en la ĝeneral-klerigajn lernejojn (respondantaj je nuntempaj gimnazioj) kaj en la unuagradajn pedagogiajn kursojn, kiuj celas pretigi ĝeinstruistojn por la unuagradaj ĝeneral-klerigaj lernejoj.
(Laŭ „Bulgara Esperantisto“.)

Propagando inter la Litova Ĝe-instruistaro.

Litova Esperanto Asocio turnis sin pasintan jaron al la ministerio de popola klerigado petante enkonduki Esperanton en lernejojn. Ministerio respondis, ke ĝi konsideras la demandon pridiskutinda, sed samtempe rimarkis, ke ni ne havas sufiĉe da E-instruistoj.

Por forigi tiun mankon, mi nun ĉiel penas disvastigi E inter ĝeinstruistoj. Dum nunfaraj someraj instruistoj-kursoj E estis instruita en jenaj urboj: Kaunas (2 kursoj), Ukmergė kaj Mariampolė. En tiuj urbejoj, kie ni ne havas E-instruistojn, ni penis almenaŭ fari propagandan paroladon pri E kaj po 1—2 enkondukaj lecionoj. Tiacele mi fari plejparte piedvojaĝon al Alytus, Mariampolė,

ŝajne, ĝi ne ankoraŭ estas mortigita de sia vintra dormo.

Ĝi moviĝas peze, mallaboreme sur la blindiga blankaĵo de l' neĝo kaj formas tie nigran makulon. Sed post nelonge ĝi revenas en sian marĉeton. Kaj denove ekregas la nerompebla frankvileco kaj profunda senloĝiteco de tiu dezerta regno de la neĝo.

Nenia aglo flugpendas en la bluj altajoj. Nenia flugilo fendas la trankviligintan aeron, kaj nenia sono vekas ĝiajn spacojn.

Sed jen la malvarma sunĝlobo malrapide dronas post la horizonto en fajregan nubon. Iom da tempo Cerni-monto¹⁾ ruĝiĝas ankoraŭ surverŝita de la lastaj radioj, poste paliĝas, malheliga, malafabliĝas, orla kaj sovaĝa, en la malheliginta alteco.

Super la montaron falas la vespera malvarma krepusko; frostaj nebuloj eliras el ĝi kaj peze falas super la mallumiĝintan mont-ebenon.

Estiĝas la longa tomba nokto de l' montaro. La frosto eligas la ventojn, kaj ili malbonsigne ekbruegas en la mallumon.

Ie, trans disŝiritaj momente nuboj, ekrigardas frostiganta pro malvarmo, tremanta steloj kaj ree perdiĝas post la dika vualo.

La vento furioze bruegas. La abloj ĉe la valo, kie murmuras la montaro, krakigas siajn branĉojn kaj malgaje grincas.

Trad. Iv. H. KRESTANOFF.

¹⁾ Cerni = Nigra, fama monto en la majesta Vitoŝa montaro super Sofio. — R. Tr.

Ivan Vazov.

La 26 oktobro n. tuta Bulgario festos malfontan jubileon: la 50-jaran verkadon de la nacia poeto Ivan Vazov kaj la 70-jaran datrevenon de lia naskiĝo. Malfoste estas festo pli merita ol tiu. Duonjarcenton la ĉarma Vazov'a kanto — ĝoja kaj malĝoja, gaja kaj malgaja — disportigis en ĉiuj anguloj de la bulgara lando, kaj multon scias parkere la bulgara popolo. Jam tri generacioj trapasis tra skolo, kie la gepatra lingvo kaj literaturo estas lernataj ĉefe laŭ la Vazov'a poezio kaj prozo. Kiel Turgenjev por Rusio, Mickeviĉ por Polio, V. Hugo por Francio kaj Goethe por Germanio, tiel estas Vazov por Bulgario.

Pro la antaŭstaranta jubileo, la nacia Sobranje (parlamento) unuanime voĉdonis al li 100 000 bulg. Levan donacon, kaj la tuta popolo faras monokoleton kiel esprimon de sia danko al la nacia poeto.

Liaj verkoj estas tradukitaj en multajn fremdajn lingvojn. Jam kelkaj liaj rakontoj estas presitaj en diversaj esp. gazetoj, kaj ekzistas en Esp. ĉe aparta kolekto „Bulgaraj Rakontoj“.

Okaze de la tradukado en Esp. de lia fama kaj plej granda bulgara romano „Sub la Jugo“ (Pod Igot), mi rievis sekvantajn lian leteron, spegulantan samtempe lian opinion pri Esp.:

Mian permeson vi havas. Mi dankas al vi, ke per via traduko vi konatigos la esperantistan mondon kun miaj verkoj. Mia opinio pri Esperanto estas, ke ĝi estas la plej perfekta ĝis

nun artefarita lingvo, kreita kun celo proksimigi la homaron kaj ĝin fari pli alirebla por komunkulturaĵ valorajoj.

Jen malgranda rakonto de li, donanta sufiĉan ideon pri lia naturpriskribo.

Iv. H. KRESTANOFF.

La altaĵoj.

Rakonto de Ivan Vazov.

Dika, de nenia homa paŝo tuŝita neĝo kovras per blanka tavolo la apudnuban, nudan ebenajon de Vitoŝa-montaro.

La suno el la sennuba malvarma ĉielo brilas hele, sed malvarme sur la mortan dormon de l' montaro.

Tomba silento regas.

Nur en unu valo meze de tiu ebenajo, sub glacio, inter la malfostaj abloj klinintaj malgaje senmovajn branĉojn, susuras io elsub la tero, kvazaŭ la montaro ĝemas aŭ parolas al si. Estas la subnuba rivero, kiu pli malproksime sin jetas en blankajn akvofalojn inter la nigraj rokaj super Bojana¹⁾.

Tie ĉi kaj tie, super la blankaj ekdormintaj montetoj, tramordas la neĝtavolon akraj ŝtonegoj kaj enigas siajn dentrandojn en la trankvilan ĉielon.

Tiuj ĉi ŝtonegoj fortigas la sovaĝecon de l' bildo.

Jen tie, el la ombro de iu truoj, formita de la traboj, urso eliras kaj ekiras malrapide ten. Ver-

¹⁾ Vileĝo apud Sofio. — R. Tr.

Jurbarkas, Siauliai, Ukmergė. Ĉie miajn paroladojn ĉeestis kelkdek ĝis cent kelkdek ĝinstruistoj, ĉie estis aranĝataj pri E diskutoj, kiuj tiom konvinkis la aŭskultantojn pri la neceso de E, ke preskaŭ ĉiuj aĉetis E-lerneolibrojn kaj komencis lerni E; multaj eĉ jam ekbonis E-jurnalojn. En ĉefa liria instruista seminario E nun estas daŭre instruata, por seminario biblioteko estas aĉetitaj E-libroj, abonataj multaj E-jurnaloj.

Do ni povas nun esperi, ke la plejmulto de la litova ĝinstruistaro estas nun gajna pri E kaj per tio la enkonduko de E en litovajn lernejojn en proksima estonto estas preskaŭ certigita.

Kaunas (Kovno), Litovujo, septembro 1920.
Instruisto J. MACERNIS.

La Estona Instruistaro.

La Tutestona kongreso de instruistoj la 13-an de junio akceptis proponon de ne-esperantista instruistino f-ino Valge pri postulo de deviga instruado de Esperanto en la popolernejoj. La afero estas esplorata de speciala komitato.

(Laŭ „Esperanta Finnlando“.)

Atentigo.

Pro teknikaj cirkonstancoj ni povas aperigi en oktobro nur unu numeron (7). La sekv. n-ro 8 aperos meze de novembro, kaj de tiam ET elirados regule ĉiusemajne.

La nombro de la daŭraj abonantoj nun proksimumas 500, krom filo estas unuope vendataj ĉ. 100, kaj ĉ. 200 ekz. estas sendataj senpage al eminentaj ne-esperantistoj, ministerioj, komercaj ĉambroj, foir-oficejoj, aŭ interŝange kun aliaj esp. gazetoj. Sed por daŭre ekzistadi ni bezonas minimume 1000 abonantojn, kaj ni esperas atingi tiun ĉi nombron, kiam ET elirados regule ĉiusemajne.

Depost nun ni povas ankaŭ regule presigi raportojn el la asocioj kaj grupoj kaj aliajn interesajn informojn; ni do petas pri alsendo, sed nur de gravaj, precipe de atingitaj sukcesoj en la praktikoj.

Ankaŭ ni atentigas pri la organizota Internacia Esp. Servo por la Gazetaro; mankas ankoraŭ kunlaborantoj en multaj landoj. Ni devas nepre gajni la gazetaron por nia ideo, kaj jen estiĝas vojo, kiu eble kondukos al la celo! (Vidu pri IES en la specimena n-ro., kiun ni posedas ankoraŭ grandakvante kaj kiun ni povas sendi senpage kontraŭ respond-kupono aŭ poŝtmarkoj.)

Ĉar la eldonanto de ET samtempe estas redaktanto de germana ĵurnalo kaj direktanto de presejo, kie multaj laboroj urgas, lia tempo estas trege limigita, kaj li ne povas regule respondi ĉiun leterojn, demandojn, proponojn ktp., pro kiuj li ĉi-loke dankas. Pri tio li petas senkulpigon kaj paciencigon.

La daŭrigoj de „La Senlingvulo“ kaj de la sciencita artikolo de d-ro Winsch ne trovis lokon en la hodiaŭa n-ro., ĉar por la prokrastita eldono de la cetera materialo tro ampleksiĝis. Estonte tia interrompo ne okazos pro la ĉiusemajna elrado de ET.

Komerco kaj Foiroj.

Fondo de Germana Esperanta Komerc Korporacio.

En Berlino kelkaj samideanoj, en rilato kun eminentaj komercfirmaj, sukcesis fondi la supre nomitan korporacion (vidu anoncon!), kiu akcelas la negocadon de germanaj komercaĵoj je fidinda bazo sen troprofito. Eksterlandaj komercistoj ŝparas la vojaĝokostojn Germanujon, transdonante la reprezentadon de sia firma al tiu ĉi korporacio, kaj kiam ili vizitas Berlinon, la korporacio informos ilin pri favoraj aĉetebloj. La servoj de la korporacio konsistas plue en la ekspedo de prezaroj, katalogoj kaj ofertoj eksterlandan. Ĝia ĉeftasko estas enkonduki nian lingvon kiel komercingvon; tial ĝi interrilatas kun la ĉefaj komerc-ĉambroj de la mondo por instigi ilin akcepti Esperanton kiel oficialan mondhelpingvon.

Komerca Esperanto-Instituto München.

La instituto (Isabellastrasse 40, dir.: s-ro Hans Sappl) estas fondita en majo n.j. kaj evoluas kontentige. La loka komercistaro uzas ofte ĝiajn servojn. Ĝi peras la vendon de komercaĵoj en la eksterlandon kaj tradukas katalogojn, prezarojn ktp. en Esp.

La IV-a Internacia Foiro de Frankfurt a. M. okazos laŭ komuniko de la foir-gazeto (1-a speciala n-ro) la 10-16 aprilo 1921. Ankaŭ pri la reklamo de la kvara foiro Esperanto estos grandmezure utiligata.

Sukceso de la 1-a Internacia Foiro en Reichenberg (Ĉeĥoslovakio).

En sep foiraj domoj kaj en granda pormaŝina fendo estis reprezentataj la foiraj komercaĵoj. La impona specimena-elmoto estis dividita laŭ 20 komercaĵaj branĉoj. La oficiala nombro de la seriozaj aĉetantoj de la Reichenberga foiro estis proksimume 35 000, inter ili 5 000 el eksterlando. Grandnombro estis reprezentataj Germanlando, German-Aŭstrio, kiel ankaŭ Anglujo, Holando, Hispanujo, Hungarujo, Rumanujo. Ankaŭ al Sud-Ameriko, Egiptujo kaj Turkujo oni faris grandajn negocojn.

La Esperanto-servo dum la foira semajno, kiun gvidis s-ro Ing. Scholze, bone funkcis. Apud la stacidomo estis E-informejo en la oficiala foira kontoro. La estraro estas nun konvinkita pri la uzebleco de E por foiraj celoj kaj uzos ĝin por la reklamo por la sekvantaj foiroj. La estraro intencas aranĝi specialan E-kurson por la oficistoj de la foira kontoro.

La Dektria.

La Loka Kongresa Komitato por la Dektria Universala Kongreso 1921 en Praha (Ĉeĥoslov.) komunikas jenon:

Gesamideanoj!

Laŭ la decido de la XII-a en Haag la XIII-a Universala Kongreso de Esperanto okazos en aŭgusto 1921 en Praha.

Ĉeĥoslovakaj ĝe-esperantistoj, ĝoje salutante tiun ĉi decidon, plezurege faros ĉion eblan por la plena sukceso de la manifestacio de Esperanto en la ĉeĥoslovaka respubliko.

La ĵus konstituita loka komitato jam komencis siajn preparajn laborojn esperante, ke ĝi trovos kunhelpon de la tutmonda esperantistaro por povi brile plenumi sian grandan honoran taskon.

Ni petas ĉiujn niajn ĝeamikojn jam de nun fari ĉion necesan por povi partopreni la XIII-an, kaj instigi la aliajn por kunesti. Disvastigu la konon pri la naturaj belaj de la venonta kongresurbo Praha kaj Ĉeĥoslovakujo, kie la esperantista movado estas de longe fidel vigla.

Invitante vin sincere en la belegan historian ĉefurbon de nia renovigita ŝtato, ni esperas, ke vi grandnombre partoprenos la kongreson kaj estos kontentigitaj per nia laboro.

Ĝis la reveno en Praha!

Loka Kongresa Komitato.

I-a SCIIGO.

La 29-an de septembro 1920 en la komitata kunveno de la Ĉeĥoslovaka Esperanto Asocio, Esperantista Klubo kaj Rondeto de Esperantistinoj oni elektis jenan lokan kongresan komitaton:

Prezidanto Eiselt, eksgimnaziestro; vicprez. 1. Kraus, magistrata oficisto; 2. f-ino Supichová, instruistino; ĝenerala sekretario Pitlik, komerc-ministeria komisario; sekretariino f-ino Dlouhá, oficistino de ŝtataj fervojoj; kasisto Novák, hofloĝisto. Por la „Verda Stelo“ estis elektata MUDr. Bišchpky.

Sekciestroj: 1. financa Hromada, oficisto; 2. propaganda Bouška, urba oficisto; 3. presa Weiner, redaktoro; 4. loĝiga f-ino Moudrá, instruistino; 5. por distrajtoj f-ino Hlaváčová, instruistino; 6. aranga Lukáš, studento de la universitato; revizoroj: d-ro Kohout, landa ĉefkonsilanto, kaj Vondruška, landa revidento.

Ĉiun korespondojn kaj aliĝojn oni sendu (por respondo resp.-kup. aŭ afrakon en naciaj poŝtmarkoj) al s-ro: Aŭgustin Pitlik, Praha III, Nerudova ul. 40.

Internacio Katolika.

Aŭstrio.

(Aŭstruja Katolika Ligo Esperantista, Katolika Unuiĝo Esperantista en Vien.)

Dimanĉe, la 19 sept., okazis la 8-a ĝeneral-kunveno, pri kiu la plej eminenta kristana gazeto en Vien „Reichspost“ (21 sept.) raportis jenon:

La 6-a Int. Kat. Kongreso Esp. en Hago rezultigis la fondon de „Internacio Katolika“, kiu havas la taskon „esperantistigi“ la jam ekzistantajn grandajn organizaĵojn katolikajn, t.e. „fakte“ kunligi kiel eble plej baldaŭ la katolikojn de la tuta mondo. En ĉi tiu senco okazis dimanĉe la ĝk. de la Kat. Unuiĝo Esp. en Vien. Antaŭe, je la 9-a, la ligo prezidanto provincialo P. Francisko Meštan faris solenan E-diservon kaj predikon en la kapelo de Kolping-domo. En la ĝk. la administrativa vicprez. Siedl povis saluti reprezentantojn de ĉiuj grandaj katolikaj organizaĵoj Vienaj. Kiel anstataŭanto de Lia kardinala moŝto ĉeestis provincialo P. Meštan. La horo de „Verda Stelo“ kantis la E-himnon. Poste raportis direktoro Schamaneck, lektoro por E ĉe la teknika altlernejo, kiu partoprenis en Hago kiel delegito, pri la 12-a Universala kaj pri la 6-a Katolika Kongreso en Hago. Revidento Frey dankis al la 62-jara fervorega esperantisto precipe por lia oferema laboro en la teknika altlernejo. Koncerne la intencitan propagadon s-ro Frey atentigis pri kvar grandaj aŭtente okazontaj kursoj por kat. ĝinstruistoj, por ĝestudentoj de aliaj kaj mezaj lernejoj. La kursoj celas ekzistigi E-ĝinstruistojn kaj propagadon-oratorojn, kiuj kune kun la grandaj katolikaj organizaĵoj printempe 1921 ekkaras la grandan ĝeneralan propagadon. Rezulte de la mondmilito komenciĝas nun en Vien kiel en la tuta mondo tre favora por Esp. internacia movado. Kvankam la ideo de d-ro Zamenhof, kunligi la 1600 milionojn da homoj efektive, ne estas realigebla, unu ligo estas efektive: la unuigo de la tutmondaj katolikoj per la devizo „Unu kredo kaj unu komuna lingvo“. S-ro Frey finis sian paroladon per alvoko al ega laboremo.

Nome de „Katolika Virinligo de Malsupra Aŭstrujo“, grafino Walterskirchen promesis sian subtenon, nome de „Kristane-Germana Studenta Ligo“ prez. Pichler, kaj nome de „Popol-Ligo“ vicprez. reg. kons. Paullitschke.

La novelektita estraro de la ligo estas: Prez. Prov. P. Fr. Meštan, VP. red. Schröder, S. cand. phil. Emma Pockberger, K. privatulo Winkler, kaj konsilantaro.

La estraro de la Kat. Unuiĝo Esp. en Vien estas: P. revidento Rud. Mich. Frey, VP. B. Ullm, Sekr.-oj Bischof kaj Pieta, K.-oj Deistler kaj s-ino Krämer, Bibl.-oj Siedl kaj Chiba, kaj konsilantaro.

Oni bedaŭris la ekŝigon de la ĝisnuna administrativa vicprez. Siedl, kiu pro sanecaj kaŭzoj rifuzis la reelekton. Fine estis plenumataj unuaj aferoj. Fermo de la ĝk. je 12.45 h.

* * *
La „Katolika Esperanto-Sekretariejo“ en Wien I, Kleeblattgasse 7, estas malfermata ĉiutage de la 9-a atm. ĝis la 9-a vespere.

La E-diservo estas ĉiun 3-an mondatimanĉon je la 9-a atm. en Wien VI, Gumpendorferstr. 59.

La kunveno en kafejo „Wienzeile“, VI, Linke Wienzeile 36, estas ĉiun merkredon de la 5-a ĝis la 7-a.

Esperanta Kroniko.

Germanio.

REVELO. Post la bone sukcesinta kongreso en Düsseldorf Revelo reekmarŝas. La nova estraro konsistas el sekvantaj membroj de la prezidanta grupo Köln (Kolonio): P. s-ro Junker, Köln; VP. s-ro Hurler, Köln; S. f-ino de Haas, Köln-Mülheim; K. s-ro Jung, Horrem ap. Köln. — En diversaj lokoj novaj kursoj. — En Köln oni sukcesis post multaj vanaj klopodoj enkonduki Esp. ĉe la laboristoj kaj interesigis la redakcion de la socialdemokrata organo „Rheinische Zeitung“ por nia afero. — Post artikolo pri Internacio Katolika en „Kölnische Volkszeitung“ la fondo de katolika grupo en Köln estas preparata. Detaloj en sekv. numeroj.

SOL (Sud-okcident-germana Ligo). Post egaj klopodoj oni sukcesis trovi sekretarion de la ligo por anstataŭi s-ron Kreuz troŝargatan per la estraro de la Esp. fako en la Frankfurta foirkomitato. Nova adreso: C. Barthel, Wöhlerstraße 14, Frankfurt a. M. — La ligo baldaŭ konatigos la programon por la vintra sezono.

EL LA GRUPOJ.

FRANKFURT a. M. (Loka Grupo.) Okazis la jarkunveno. Nova estraro: P. s-ro Urban; S. s-ro Kreuz; VS. s-ro Barthel; K. s-ro Fricke; B. s-ro Hast. S-ro Hummel, prez. de pluraj jaroj ekŝig. estis nomata honora membro. La grupo kunvenas regule ĉiun merkredon en Moderne Sprachschule (8.50 h.), Goethestr. 10, I.

En stenografia konkurso laŭ Stolze-Schrey akiris 1-an premion s-ro Kreuz, 175 silabojn po minuto, kaj Natale, 60 sil. 3-an pr. ricevis s-ro Frey Eisen; ĉiuj tri membroj de la loka grupo.

— (Blindula Grupo.) Regule kunvenas en Blindenanstalt, Adlerlychtstr. Ernesto, dekdujara blindulo, reveninte de libertempo pasigita en Nederlando, faris fluan paroladon en loka grupo pri sia vojaĝo ktp.

— (Laborista Grupo.) Pluraj kursoj marŝas. Oni kunvenas regule en Esperanto-hotelo Anton, Niedenu 12, ĉiun vendredon je 8 h.

MÖRS. Por Esp. kurso ĉe la popola altlernejo sin anoncis 24, por ldo-kurso 2 partoprenantoj.

Hungario.

BUDAPEST. La 7 okt. estis en la bibliotek-ĉambrego de Komerc Muzeo prelego de s-ro A. Laquer pri la Pariza kaj Hago Kongresoj. Samtempe estis ekspozicio de Esp. komercaj reklamoj. — S-ro J. Major instruas Esp. kun permeso en 6-a klaso de popolernejo. — S-ro P. Balkányi finis kurson kun 8 ĝelerantoj. — Faggazetito de oficistoj kaj komizoj publikigis alvokon partopreni la internacian eksperimenton de Germ. Esp. As.

KISPEST. Nova laborista grupo. — Adreso: Szigligeti u. 11. Prez.: S. M. Zsámboky.

Rumanio.

PUJ (Hunjad). La Transsilvania kaj Banata landa socialdem. partio en landa kongreso oficiale alprenis Esp.

Grafologio.

De ĉi tiu numero ni startigas en nia ĵurnalo Grafologian Rubrikon de ni promesitan en nia unua prospekto. Ni estas certaj, ke la samideanoj plezure akceptos la novaĵon, kies redaktadon aŭte prenas sur sin la ĵus fondita Grafologia Esp. Instituto en Pisa (Ital.) Ĉiuj ja scias, ke la grafologio ne estas ĉarlatanaĵo, sed serioza scienco kvankam tre juna, kaj ke efektive — post studado kaj praktiko — oni povas ekkoni la moralan karakteron de tiu ajn persona trealeganta ĝian skribadon.

Gesamideanoj dezirantaj ricevi certan, sciencan respondon pri sia karaktero, siaj emoj kaj kvalitoj, sendu 2-paĝan leteron, nature kaj senpripense skribitan (nek dikte nek kopie) al Grafologia Instituto — Casella Postale 47, Pisa (Ital.) ĉe-sendante 1 ital. lir. (en nacia mono laŭ nuntempa kurzo aŭ resp.-kup.) por respond-espezo k. a. (sciigu laŭdezure ankaŭ pseŭdonimon krom la subskribo).

En ĉiu numero de ET aperos la rubriko, donante laŭvice respondojn al ĉiuj plenumitaj la petitaj kondiĉoj.

Internacia Esperanto-Servo.

(La traduko kaj la represo en naciaj ĵurnaloj kun aldono de la vortoj) „Internacia Esperanto-Servo“ estas permesata.)

NIA MONATA LETERO EL LISONO.

San Francisco, oktobro 1920.

La plej grava politika okazinto en Usono estas la akcepto per la 36-a ŝtato, nome Tennesse, de la dekaŭda aldono al nia konstitucio, kiu legas:

1. La rajto de Usonanoj voĉdoni ne estas aŭ nenigita aŭ nebligita, nek de la unuiĝitaj ŝtatoj nek de iu ŝtato, por sekso.
2. Parlamento havas la povon, pere de taŭĝaj leĝoj, efektiviĝi la provizojn de tiu ĉi artikolo.

La aldono estis unue antaŭmetita al nia parlamento la dekan tagon de januaro 1878 kaj aprobita de nia Domo de Representantoj la 21-an de majo 1919 kaj de la Senato la 4-an de junio 1919.

La ŝtato ŝtato ĝin aprobita estas Illinois, kies Senato aprobis ĝin la 19-an de julio 1919, kaj la lasta ŝtato Tennesse, kiu aprobis la aldondon la 18-an de aŭgusto 1920.

La ŝtatoj, kiuj ne aprobis, estas plejmulte laŭ la marbordoj de l' Atlantiko kaj de l' Golfo de Meksiko. La sola okcidenta ŝtato, kiu ne aprobis, estas New Mexico.

Pro la aldono 26 milionoj da virinoj estos permesitaj voĉdoni por nia estonta prezidanto, kaj la kandidatoj de la Respublikana kaj Demokratia partio faras ĉion eblan por kapti tiujn ĉi voĉojn.

Pro la voĉoj de la virinoj sendube dum la venontaj dek jaroj okazos multaj ŝanĝoj de fundamentaj ŝtataj kaj federalaj leĝoj, kiuj, ekzemple, donas la gardon de la infanoj sole al la patro; kiuj ne permesas al virinoj teni publikan oficon; kiuj deprenas de virinoj edziĝintaj al ne-usonanoj la civitaneco kaj tial la eblecon voĉdoni.

La venko estas ne sole venko por virinoj, ĝi estas venko por demokratoj kaj la principo de egaleco, je kiu la nacio estis fondita. Ĝi signifas, ke nia demokrato kaj kreskas kaj estas kapabla ke renoviĝi sian vivon kaj alpreni al si la novajn demandojn de progresema epoko.

A. S. Vinzent.

LETERO EL HUNGARLANDO.

La sepsemajna bojkoto malutilis nur al la terkultura produktado de Hungarlando. Pro la bojkoto farigis neeble fensi la grandkvantaj frukto- kaj legomo-amazonj desinitajn por la eksporto, kaj tiamaniere precipe la urboj Kecskemét, Nagykőrös, ktp., kiuj ĉefe okupiĝas per produktado de eksportfruktoj kaj legomoj, havas multajn milionojn da perdo. La malprofito estus estinta eĉ pli granda, se la hungaraj konservo-fabrikoj ne estus jam dum la milito atingintaj sian maksimuman produktokapablecon; per ĉi tio ili povis la plej grandan parton de la frukto kaj legomkvanto, kiun la hejma konsumantaro ne povis transpreni, translabori je konservoj, kiuj povas esti nun eksportataj. Oni parolas pri produktantoj, kiuj havas milionojn da malprofito, sed ili esperas nun per malfermo de la limoj per pli ampleksa eksporto de malfruj legomspecoj regaini parton de la malprofito. Pli grandan malprofiton havis la terkultura produktado per reteno de la germana draŝkarbo kaj de benzino, pro kio la draŝo malfrugiĝis kaj oni povis por la novan rikolon nur meze de Aŭgusto en la muelejojn.

Tiu ĉi malfrugiĝo tamen ne multe malhelpis la nutraron, ĉar Hungarujo vivas en Aŭgusto ankoraŭ el la antaŭjaraj provizoj.

En la komerco oni sentis nur malmulte la bojkot-efikon. La komercistoj havas plenan magazenojn, kaj pro la malgranda aĉetemo ili ne povas akiri novajn provizojn. La industrioj, precipe la mebla, maŝina, teksa, argila kaj kemia industrioj estis por monatoj provizitaj per krudmaterialo, do ili ne sentis ian gravan malhelpon. Ĉi tion pravas ankaŭ tio, ke en la maŝinindustrio oni forlasis nek unu laboriston, eĉ kelkaj uzinoj, precipe la terkultur-maŝinfabrikoj, devis dungi novajn laboristojn. Sole la meblo-industrio, kiu laboras por eksporto, suferis malprofiton, ĉar jam eksportopretaj produktoj ne estis liverablaj. Sed ĉe tio ne la bojkoto estis la ĉefa kaŭzo, sed la malfrua eldono de la eksport-permesoj. En la eksport-industriaj rondoĵoj oni esperas, ke pro la malalligito de la kronvaluto sur la allandaj merkatoj sekvos nova vigligo de la hungara eksporto, per kio la malprofito pro la lamigo de la hungara eksporto preskaŭ tute egaligis.

Filatelio.

(Ĉiujn novaĵojn, artikolojn ktp. oni sendu al E. Fethke, Oppeln, Ring 11, Supra Silezio (Germ.). Al la sendintoj de sciligo samideanan dankoj! Mi petas plujan novaĵojn.)

AŬSTRIO. Novaj gazetimarkoj: 5 heller griza, 6 h. verdblaua, 10 h. brikruga. — Okaze de la liberigo de Radkersburg kaj Spielfeld aperis la aŭstraj markoj ĝis 20 kr. kun surstampo „Befreiung Radkersburg 26. Juli 1920“ kaj „Befreiung Spielfeld 27. Juli 1920“.

BULGARIO. Kun surstampo bulgarlingva „Por niaj militkaptivoj“ aperis dum junio 2, 5, 10, 15, 25, 30, 50 stot. (Boris), 1, 2, 3 leva. — 3 stot. ruĝelbruna (Boris), 50 stot. bruna (Boris).

DANZIGO. Nova eldono de Danzigaj poŝtmk. Detaloj mankas al mi.

DANIO. Novaj valoroj: 8 ŝre griza, 70 ŝ, bruna-verda, 90 ŝre bruna-oranĝruĝa.

ESTONIO. Kun surstapo „Viga statud ŝtudente“ (por la invalidoj) aperis du novaj pm.: 55 kaj 10 pen. brikruga-olivkolora, 70 kaj 15 pen. blua-bruna.

GERMANIO. La malnovaj pm. aperas parte en aliaj koloroj: 5 pf. ruĝbruna, 10 pf. orangkol., 20 pf. verda, 30 pf. helblua, 40 pf. karminkol., 50 pf. helviola, 60 pf. olivverda, 75 pf. malhelviola, 80 pf. malhelblua.

HISPANIO. 20 cent. violkolora.
LIECHTENSTEIN. La nova pm.-serio pliriĝis per 6 novaj valoroj (50 heller ĝis 7 1/2 kronoj). Aperis poŝpagmarkoj („Porto“-markoj).

MEMEL-TERRITORIO. Aperis francaj pm. kun surstapo: Memel 10 pfening (12 valoroj, nome de 5 pf. ĝis 3 mk.). Same aperis kun surstapo „Memelgebiet“ germanaj pm. (13 valoroj, 5 pf. ĝis 3 mk.).

Recenzejo. GAZETOJ.

Ni ricevis sekvantajn gazetojn:

Bulgara E-isto, junio-julio; E-a Finnlando, sept.; E-ista Laboristo, okt.; Esperanto LIAE, sept.; Esp. Itala Revuo, sept.-okt.; E-Praktiko, okt.; Hungara E-isto, sept.-okt.; Int. Komercia Revuo, febr., marto-aprilo, majo-junio; La E-isto, julio-aŭgusto; La Revuo Orienta, aŭg.; La Studento, aŭg.-sept.; Le Monde E-iste, sept.-okt.; L'Esperanto, aŭg.-sept.; Monata Bulteno, Sabadell, sept.; Nova Tempo, aŭg.-sept.; Kőzep Duna, 30. sept.; Neue Lodzer Zeitung, 19. sept.

PEACE AND GOODWILL (Paco kaj Bonvolo), Julio 1920. Eldonita de la Paca Societo, 47, New Broad Street. EC. Wisbech (Angl.).

Enhavas interalie proponon pri konstitucio de Internacia Ligo de Kristianoj kaj de personoj, kiuj malvolvas militajn armilojn. Interesuloj skribu al Miss M. Watson, 20 Ongar Rd., London SW 6.

DEUTSCHE POST (Germana Poŝto), 7. okt. Kun artikolo pri Esp. kiu ankaŭ aperis en la poŝtaj revuoj; Deutsche Verkehrs-Zeitung, Poŝtalice Rundschau, Deutsche Post-Zeitung, Die Postwelt kaj Linter dem Reichsadler. La artikolo celas prepari la propagandon inter la poŝtistaro.

Volonte ni preparos kelkajn artikolojn en la Esperanta gazetaro; sed bedaŭrinde mankas la spaco. Precipe interesa estas artikolo „La danĝero de disfalo“ en Esp. Finnlando. Rimarkinda estas ankaŭ la disalo de la sovinista „Studento“, ke ĝi ricevis nur dek abonojn. La redakcio miras pri tio; ni, kontraŭte, tre bone komprenas la malemon de la s-anoj aboni Esp. revuon predikantan sovinismon kaj enhavantajn sufiĉe da silaj gramatikaj kaj skrib-eraroj. Sed pri tio ni miras, ke ano de nia Akademio (s-ro G.J.-M.) esprimas al la redakcio sian specialan intereson por la sovinistaj artikoloj.

LIBROJ.

VIVO DE ZAMENHOF. Edmond Privat. Libro Bolingbroke-Mudie. Eldonis Brita Esp. Asocio, London WC1. 208 p. 14 x 19 cm. Kun multaj ilustraĵoj. Prezo 3 ŝil.

Nur kun profunda kortuŝo oni legas kaj relegas tiun ĉi libron, en kiu nia lerta verkisto Edmond Privat prikskribas la vivon kaj penson de nia kara Majstro. Ne sekla biografio ĝi ja estas, pli ĝi impresas kiel altalteste skribita romano aŭ ankaŭ pli kiel beleza poemo pri bonfaro kaj estonta pli bona homaro, kiel laŭdokanto pri heroo batalanto pro paco kaj justeco. Esperon kaj konfidon oni ĉerpas el ĉiuj ĉi ĉapitroj, novan pli grandan fervoron, novan pli ardan entuziasmon, novan pli firmajn volojn je obstino kaj persisto, ĝis la celo estos atingita.

Al ni E-istoj la enhavo estas plejparte jam konata, tamen ĉiam denove ni relegas ĝin kun atento kaj intereso, precipe ĉar ĉi tie ĝi estas al ni prezentata en speciala stilo, pli nobla ol kutime, iel altiga, sanktiga. Sed dezirinde estus, ke ankaŭ la ne-esperantista publiko eksci u la romanon de tiu genulo, kiu dum sia tuta vivo nenion sopiris, nenion pensis, nenion predikis, nenion faris ol la bonon de l' homaro, ke la verko estu tradukata en naciajn lingvojn por allogi novajn idealistojn al nia ideo.

La tipografia vidpunkto la libro estas preskaŭ ne ri-proĉinda. Papero bona, literoj klaraj, multaj klisajoj ilustras la tekston. Nur du negravaj preserarojn mi trovis en la tuta libro.

Laŭ ĉio, oni ne povas sufiĉe rekomendi la verkon; ĝi estas kaj supozeble restos unu el la plej valoraj trezoroj de nia literaturo.

LA VERDA KAKATUO. Unuakta groteskajo de Arthur Schnitzler, tradukita de Joh. Schröder. 65-paĝa, mondformata (16 1/2 x 11 1/2) havebla ĉe la eldoninto Joh. Schröder-Wien VII, Kaisersr. 10. Prezo nur 3 resp. -kup. Germanlingvaj literatur-amikoj jam delonge ŝatas la spritajn brilantajn verkojn de Schnitzler; ĉi tiu groteskajo, antaŭludo de la granda franca revolucio, verketo nepre leginda, intensigas la atentecon de la leganto ĝis ekscito. Pri la traduko: s-ro Schröder estas LK-ano. (Babeor.)

LA ROZUJO ĈILMILJARA. De Mabel Wagnalls, tradukita de Edward S. Payson. 47 p. 17 x 12 1/2. Prezo 35 centoj. Rakonto sufiĉe fantazia kaj riĉa je neverŝajneblaj de ne tro alta literatura valoro. La traduko enhavas multajn amerikanismojn (kio signifas „aĉetita ruĝa buŝo“?). La ofta ŝanĝo de verbaj tempoj en la sama frazo estas ne laŭdinda. Pro kio do ekzistas ELA? Jam la titolo ne estas irafa; ĉar kial la rozujo estas „ĉiu“-miljara? (Babeor.)

REPORTA STENOGRAFIO. Alfaro de la angla sistemo Piffman'a al Esperanto. Verkis Montagu C. Butler. 5-a eldono. Havebla ĉe s-ro P. I. Cameron, 69 Schubert Rd., London SW 15. 48 p. 21 x 18 1/2. Prezo 2 ŝil. 6 pencoj.

Ke ĝi aperas je la 5-a fojo, pravas ĝian uezblecon. Por germanoj, kies ĉefaj stenograf-sistemoj estas ne geometriaj sed grafiĝ, ĝi ŝajnas sufiĉe malfacile lernebla, precipe por la stiloj ktp.

NIA ĈILTAGA PANO. Dua eldono. Kompilita kaj tradukita el la angla lingvo de W. Wilson Trainer, Glasgovo. 71 p. broŝ. Prezo 6 pencoj.

Jus aperis la dua eldono de la libreto: „Nia ĉiutaga pano kaj ĝia influo sur la vivoj de la homoj. Serio de frikde doktrinoj pri dieto substantaj de kelkaj el la plej famaj homoj.“ — La enhavo de la broŝuro estas lukto kontraŭ la mangado de viando. La aŭtoro citas ne nur la Biblion kiel atestanton, ke tute ne estas necese mangi bestajn korpojn kaj trinki kiel bulonon, sed ankaŭ la eldonojn de scienculoj ĉiutempaj. Por vivreformemuloj kaj vegetaranoj la broŝuro estas leginda.

Laŭ lingva vidpunkto ĝi enhavas parte tre gravajn gramatikajn erarojn, ekz.: vi devas inklini sin, mi plisaniĝas (anstataŭ mallorigas), masurumaj (anstataŭ mastrumadoj) ktp. Preseraroj ankaŭ ne mankas. Kelkfoje la sencoj de frazo (propozicio) estas preskaŭ nekompreneblaj ĉu pro angla pensmaniero rilate la tradukon ĉu pro aliaj strangaĵoj. (G. Aju.)

Alvoko al la poŝtöficistaro tutmonda.

Mi ne volas denove klarigi la utilecon, profitojn de nia kara lingvo, mi ne intencas ripeti la urĝecon de ĝia enkonduko; tion tro sufiĉe faris kaj faras la laboremaj gazetoj, revuoj, alvokoj kaj la laboreco de mil kaj mil samideanoj.

Sed necese estas refreŝigi vian memoron, ke la poŝto — kiel la plej grava organo de la internaciaj interrilatoj — ne povos tre longe resti sen tiu ĉi helpilo. Se ie, tiam precipe ĉe nia institucio ĝi devas pleje kaj plej unue sukcese selve de sia praktikeco; alie — ni estas tiuj, kiuj bezonas ĝin plej unue kaj en la plej alta grado. Bedaŭrinde kaj honte ni estas ankaŭ la solaj, kiuj ĝis nun ne unuiĝis grave.

Do mi pensis, ke la nuna tempo estas refoje tre taŭga por komenci novan kaj sur aliaj pli konvenaj fundamentoj bazitan laboradon, des pli forte, ke ni povos, se en la estonteco la sekvonta poŝtkongreso malfarmigis (ĉe la nunjara ni tute malfrugiĝis, neorganizitaj) kaj se ni prezentos nin tiutempe jam kiel unueca forta stabo, — mi diras, ni povos atingi almenaŭ tion, ke la kongreso konfesu kaj kvitancu la vivkapablecon, la disvastigadon de Esperanto kaj evivigu ĝin — minimume, kio ĝis nun ne estis ebla — inter la lingvoj permesitaj ĉe la telegrafado.

Sed por atingi tion estas dezirinde ekscii, kiom da samideanoj ni estas, en kiuj landoj oni devos fari pli grandan propagandon, kiuj estas la landoj, kie oni devos batali kontraŭ la indiferenteco de registaroj kaj precipe de la poŝtöficistaro.

Do vi eble aprobas kaj, mi esperas, ILEPO ankaŭ konsentos mian nunan paŝon, kiam mi publikas la peton al la poŝtöficistaro de la tuta mondo, ke 1. ni refreŝigu Ilepon per tujaj morala kaj materiala helpo, 2. bonvolu ĉi poŝtisto (unuope) poŝtkarton aŭ scignon sendi al mia adreso, por ke oni kiel eble plej baldaŭ povu konstati, kiel granda estas la nombro de tiuj poŝtistoj, kiuj serioze kaj per dedico de la tuta forto postulas la triumfon de Esperanto en poŝtataj aferoj.

Ne lasu, ke ankaŭ ĉi tiu klopodo fariĝu sen-sukcesa!

GEORGO STEINER, poŝtöficisto, GYÖR (Hungarujo), Kletzarstr. 12.

Abonojn al ET

oni bonvolu pagi per resp. -kup. (15 por 10 n-roj) aŭ pretere per ŝtataj bankbiletoj. Ni liveros por 20 gmk. 12 n-rojn de ET, por 10 ŝil., 10 sv. flk., 10 pesetoj, 10 nordaj kronoj aŭ 5 fl. 55 n-rojn, por 10 fr. flk. aŭ 1 dolaro 20 n-rojn, por 10 italaj liroj 15 n-rojn, por 10 finnaj mk. 10 n-rojn. — Tiuj ĉi prezoj valoras por ĉiuj landoj kun valuto pli alta ol la germana. Al Germanio, la Balkano aŭ la Baltikaj landoj ni liveros 10 n-rojn por 10 gmk., al Ĉeĥoslovakio 15 n-rojn por 20 Kč. Specialajn prezojn por Aŭstrio, Hungario kaj Polio oni demandu ĉe niaj respektivaj reprezentantoj.

Niaj Abonejoj.

- AŬSTRIO.** Esp.-Societo por Stirio, Graz, Schönaugasse 6.
- ĈEĤOSLOVAKIO.** Otto Sklenčka, Hradec Kralové. Prof. J. Stisser, Saaz 687.
- GERMANIO.** Postschickkonto Köln 708 65, Teo Jung, Horrem Bez. Köln.
- HUNGARIO.** Páuló Balkanyi, Budapest, Hajos-utca 15, II, 2.
- POLIO.** Adolfo Oberrotman, Warszawa, Krak. Przedm. 10.
- PORTUGALIO.** Agencia Esperantista, Silva & Carreira, Rua da Assunção 42, 5.



kaj emajl-elpendaĵojn ĉiuspecajn kaj por ĉiuj celoj liveras prezinde

Stampil-Fabriko Robert Pfennigwerth
Hirschfelde (Sakŝujo, Germ.)

Esperanto-Grupo „Jadegolfo“
— Wilhelmshaven-Rüstringen (Germanujo) —
Kunveno: Stacidoma hotelo Prinz Heinrichstr. 2 lunde je 8 h.

La grupanoj korespondas eksterlanden per L. Pf. (Prezidanto: J. Laib; sekretario: B. Eden.)

Kurspartoprenintoj
deziras interŝanĝi pk. il. kaj pm. ĉiulandajn kontraŭ ŝlesvigaj Plebiscit-markoj. — Oni skribu al: ELISE JACOBS, del. IEA, FLENSBURG Mathildenstr. 9.

A. HAJKIS, studento de fizikal kaj matematikal sciencioj, Warszawa, str. Koszykowa 11-11 (Pol.) deziras ricevi detalajn informojn pri

motoroj movigataj per surradioj,
kiel la konstruitaj de Mouchot, Ericson,

Parolejo.

(Je libera dispono de ĉiu abonanto.)

22.

PRI LA LANDNOMO PROBLEMO.

En la redaktora artikolo pri la landnomoj (en ET n-ro 3/4) s-ro Teo Jung pritrakis tri demandojn, kies respondoj estas favoraj al la sukliko -io. Mia opinio estas ankoraŭ kvara demando, nome: ĉu ni vere bezonas suklikon por la landnomoj? La respondo estas: ne.

- La neakcepto de tiu ajn sukliko estas preferinda, ĉar:
1. ĝi haltigos la disputon pri laŭ-kaj kontraŭfundamenteco.
 2. ĝi redonos al la io-favorantoj la netuseblan liberecon uzi landnomojn kun -io.
 3. ĉiu sukliko por landnomoj estas superflua ŝarĝo de nia vortfarado kaj naskas regulon kun esceptoj, ĉar parto de la landradikoj ne taŭgas por aplikado de sukliko aplikbla ĉe tre limigita, preskaŭ fiksa nombro de radikoj.

Ni simple apliku regulon 15 de la Fundamenta Gramatiko, akceptante la plej taŭgajn novajn radikojn, kiuj finiĝas per -i, -land ktp., ekz. Franci, Angli, Maroko.

La uzado montrus, ke oni donas Esperantan formon al tiuj internacie konataj geografiaj nomoj, kiuj taŭgas por fari tion, ekz. Parizo, Hago. Aliaj nomoj plej ofte gardas sian nacian ortografion, ekz. Cambridge, Boulogne-sur-mer por tio, ke Esperanta formo tro kripligis ilian aspekton aŭ elparoladon. Kiel ni ne donas al ĉiu landnomo Esperantan formon forlitan:

1. de radikoj, kiuj finiĝas per -i, ekz. Belgio, Svisio, Siberio;
 2. de radikoj, kiuj finiĝas per -land, ekz. Holando, Nederlando;
 3. de radikoj, kiuj havas alian finiĝon, ekz. Maroko, Sudano, Usono, Siam;
 4. per almeto de la vorto lando post la genradikoj, ekz. Irlando, Skotlando.
- La nomoj de enligantoj estas formataj kiel kutime: aŭ per aldono de -o al genradikoj, ekz. franco, aŭ per aldono de la sukliko -an al landradikoj, ekz. siberiano, usonano.
- La necesaj radikoj estu uzataj konforme la liston presitan en la februara n-ro 1919 de la gazeto „Esperanto“. Tiam la Akademio ne bezonas malprobi la nomojn kun -io por ilia kontraŭfundamenteco aŭ kontraŭsistemececo, sed frankvile povas observi la babilon. Multaj el la kontraŭuloj de la sukliko -io pro ĝia duba vivorojto estas kontentigitaj, kaj -io facile venkos. (H. S. Donker.)
- P.S. En „Esperanto Praktiko“ majo-junio s-ro Briggemann pasante jam faris la saman proponon.

23.

ĈU „IO“ AŬ NENIO?

Malfeliĉa pentristo unufoje — ekspoziciis bildon ĝoie, — ke la homoj venu admiradi, — kian belegon verkon li povis faradi.

La unua havis rimarkon gravan, — ke li ne uzis koloron pravan. — La dua ne trovis en ĝi arbon, — laŭ la tria figuro ne havis barbon. — Kaj tiel plu, ktp.

Nia pentristo, do prudente sentante, — ke ili pravas kvalite kaj kvante, — aligis la bildon malĝoje plorante.

Kaj fine, kaj laste (ni ne parolu vĝstiel) — restis el ĝi sencecafo, — ridinda miksaĵo.

Kio sekvos el tio? — Ke same estas kun „io“.

Nia Majstro kiel pentristo, — kiun kriikas nun ĉiu lingvisto. — Kaj kial ne? — Aientu tre!

Kial li uzis la vorton „hund“ — kaj kial ne anstataŭ „kaj“ la germanan „und“? — Ĉu al vi placas sukliko „ajo“, — ĉu ĝi ne estas malbelega? — Do rapide ŝanĝi: sed ĥajpu min, — korekte anstataŭ ĝin!

Same ni uzu anstataŭ „anslataŭ“, „anslata“, — ekz. morge, kvanke, anke. — (ke nia leterpapero ne restu blank-e!). — Kaj mi ne permesas, ke „komercaĵo“ estu „varo“, — (kiu mi proponas por „batalo“, — plue, „frenuzelo“ estu „naro“, — „veturilo“ ni mi nomos „karo“ — kaj „diboĉeĵo“ fariĝu „baro“.

Sed plej grava nun nia „io“, — kiam, kiel, kie ĝin uzi, — Dio! — Ho, mi trovis „bovo“, „jovis“, — ĝin ricevu vortoj ĉia: — bela estas lingvo nia! — Gratulu min, re- formonte, — kaj kaŝu vin, lidistoj, hontel! — Tiel la batalado pri „ujo“ aŭ „io“ — ĉesus esti „necesio“, — ĉar tiam nature (kiel bele!) — oni uzos tultubere: — Finio, Finio, eĉ ĉiu „lando“ — staros ĉi tie kun nova „nomio“.

Do nur daŭrigi, daŭrigi, ke post kelkaj „annoj“ — nin ne ekkomprenu la Madagaskaranoj. — Sed ĉar ni volas pacon havi, — lasu nin de „io“ savi!

(G. Steiner, Györ, Hung.)

24.

IO-LIJO KAJ ALIAĴOJ.

Est. s-ro. Mi mem estis skribanta parte tion, kion vi diris pri -kaj -uj (en n-ro 3/4); ĉar di ĝias di = ĝ. -i ne taŭgas en Holando, ĝi fariĝas Holango. Cetere, landnomo itinganta per -land ne bezonas suklikon. Por eviti aspekton aŭ ŝajnon de ŝanĝo, oni uzu -i, -uj, -land laŭ longeco de la nomo, aŭ ankoraŭ uzu -uj por nomoj, kiuj aperis en la „Fundamento de Esperanto“, precipe Germanujo, kiam la kunteksto lasas supozi, ke oni parolas pri la metalo, kiun oni proponis nomi „Germanio“.

Se la vorto „fubulo“ (vidu ET n-ro 1) estas internacia, ĝia uzado estas rekomendinda. Se oni skribus „Rugbiludo“ aŭ „ĉudo de Rugby“, oni komprenus pli facile. Ne-uzado de ĉef-litero kaj liniojto alivestas vortojn ĝis nekonebleco. La frazo „La Angloj klinas al“ de s-ro Ajal devus esti „estas inklinaj al“.

Oni ne bezonas novan vorton ne-internacian por „komercaĵo“. Oni uzu „venĝeĵo“, kunmetite „vend(aj)-vagono“, „prezo“, „stacio“ ktp.

Mi bedaŭras vidi „broŝilo“ por „broŝo“, „kemio“ por „hemio“, „movigilaro“ por „movilaro“, „poldro“ por la sole natura formo „poldero“.

Kiam oni proponas novajn vortojn, oni difinu per Esp. mem; oni ne uzu traduk-vortojn nur de Okcident-Eŭropaj lingvoj. (Ch. G. Stuart-Meneth, London.)

25.

KONTRAŬ -IO.

E. S. I. Mi tre admiras vian gazeton kaj deziras al vi ĉiun sukceson. Tamen mi deziras protesti, tre ĝentile kaj tute sen neamika spirito, kontraŭ via uzado de la „-io“ en landnomo. Kie ni trovas aŭtorizitan centron de la movado se ne en la LK? Ni devas havi lingvan aŭtorizitan kaj al la LK — eĉ se ties konsistenco nuntempe ne lute kontentigas nin — ni pro la bono de la movado (unueco, progreso k.) sulas laŭ laŭbeonadon. La LK jam klare rekomendas la uzadon de „-ujo“. Mi petas, ke vi montru la kuragon de fortuloj kaj ĝentiloj, kiuj, malsimilaj al malpli gravaj personoj, ĉiam povas kaj kuragigas ŝanĝi opinionon aŭ agadon, kiam tia ŝanĝo estas justa aŭ konsilinda pro aliaj pli gravaj aferoj. La pli gravaj aferoj ĉi-hiurilate estas la unueco kaj la principo de la lojaleco al starigita aŭtoritatoj. Mi petas, ke vi pruĝu ĉi tiun proteston en ET. (P-ro A. J. Ashley, red. de „Eklezia Revuo“.)

26.

PRI „LJOKO“ (respondo al parolo 16).

Certe multaj scias, ke ne ĉiuj literoj estas prononcaj sammaniere de diversaj naciaj. Al tiaj literoj apartenas interalie „l“. En la plejparto de la lingvoj, kiel ekz. la

germana, franca, sveda, finna ktp., ĝi estas prononca mole, dum en aliaj, kiel la rusa, latva, parte la angla ktp., ĝi sonas malmole; ĉar, prononcante ĝin, oni tuŝas per langpinto la suprajn dentojn.

Se nun ano de unu el la lastnominataj nacioj komencas studi Esp. aŭ ĉiun alian el la antaŭmencitaj lingvoj, li, ĉiam kuliniginte al la malmoleco de „l“ kaj neniam aŭdinte ĝin prononci mole, komprenble ankaŭ ĉiokaze prononcas ĝin malmole. Por eviti tiun ĉi prononc-eraron, multaj lerno-libroj de Esp. germana kaj franca lingvoj por rusoj atentigas, ke „l“ ne estu prononcata kutimmaniere, sed mole, simile al „ll“. Kompreneble ne estas tutkorekte instrui, ke mola l = ll, tamen — kiel du montri litero al homo ne povanta imagi molan „ll“, ke li prononcu ĝin mole? Similokaze necesas, kiel diras rusa proverbeto, „elekti el du malbonoj la malpli grandan“.

(Helmi Drezan, Tallinn, Estonio, iam Rusio.)

27.

DANKO.

Tre est. s-ro redaktoro! Permesu per via ŝata ĵurnalo esprimi al la „Haarlema Komitato por disvastigi Esp.“ koregan dankon en la nomo de nia Kovna Societo E-ista pro la simpatia, korusanta alvoko, aperinta en ET n-ro 6

okaze de brulego pereiginta nian bibliotekon kaj tutan havaĵon.

Sendube tia helpo estos al ni dezirata. Tamen, eĉ se malgrandan subtenon ni ricevos, nin jam kontentigas kaj fortigas en nia laboro la konscio, ke en Holando ni havas verajn amikojn-esperantistojn, kiuj, eĉ konante neniu el ni, venas al nia helpo. Sinceran dankon al ili!

Do ne povas ne antaŭteniri, ne povas ne venki la Esp-ismo, dum ekzistas la sento de solidareco inter la esperantistoj. Vivu veraj esperantistoj! Ĝloro al ili!

(Paŭlo Medem, prez.)

28.

DANKO.

Ni rusaj esp-istoj de kaptitejo Merseburg, forveturante Ruslandon, esprimas niajn samideajn dankojn al niaj helpintoj. Precipe tutkore ni dankas la redaktoron de ET pro lia penado por la bono de li homaro.

Onufrio Gordeev ankoraŭ aparte esprimas sian koran dankon al siaj korespondantoj. Precipe li tutkore dankas I-inon Frida Simmann kaj s-ron Paŭlo Medem, kiu estas la plej humana subkolonelo.

Bonvolu ĉesigi la sendon de libroj, ĉar ni estas forveturantaj Ruslandon. (O. G.)

Eksportado.

Importado.

Germana Esperanta Komerca Korporacio

Berlin—Steglitz.

Telegrafa adreso: Germespero Berlin.

Telefono: Steglitz 3828.

Komisioj de ĉiujpecaj komercaĵoj, speciale parfumoj, droĝoj kaj tualet-artikloj ĉiuland en.

Sendu katalogojn kaj informojn!

Esperantia Entrepreno.

Reprezentado.

Perado.

Importado ... Eksportado

H. Bidaux

Esperantista Firmo.

Speciala Fakoj en:

NUTRAJ PRODUKTOJ — LIKVIROJ
VAKSKANDELOJ — PARFUMARO
FABRIKITAJ PRODUKTOJ.

Petu liston kaj prezon al S-ro
H. Bidaux, 5 Place d'Aligre, Paris 12-e.

SILK-BRODAĴON

REKTE EL ĤINUJO

mi sendas per rekomendita sendaĵo.

Belega manfarita. Skribu, kion vi ŝatas:

1. Esperanto-brodaĵo montras surskribon „Esperanto, Lingvo Internacia“.

la verdan stelon kaj la lumdonon, 2. floroj,

3. birdo, 4. besto, 5. vidaĵo, 6. arbo.

15 : 20, 20 : 30 cm 25 respekt. 45 resp.

kup. afrankite. — Sendu 1 resp.-kup.

por specimeno. Skribu en Esp. al s-ro

C. S. Gee, Chotsarloon, Mokadee,

Hai-Yen (via Shanghai), Ĥinujo.

Anoncetoj.

ACETO. Tom A. Allan, 91 Prud'homme Ave., N. D. G.

Montreal, Kanado deziras aĉeti la vortaron de Kabe.

ESPERANTA ELDONEJO faras ĉiespacajn presaĵojn (ankaŭ kun bildoj) je malkonkrebla malalta prezo. Skribu kaj petu proponojn de Fratoj Felikse, Opelein, Ring 11, Supra Silezo (Germ.).

FEROVIAJISTOJ! Por propaganda poŝtkart-ekspozicio mi petas alsendon de stacidomaj vidaĵoj kaj de fervojaj konstruaĵoj. Al ĉiuj mi resendos Pl. Mi ankaŭ korespondos. Georg Habellok, Breslau 10 (Germ.), Schleierruhest. 19.

FILATELO. Estonaj poŝtkartoj purajn kaj stampilajn mi vendas. Antaŭpaĝo. Deziras interŝanĝi papertonon. I. Vahtkeri, Luisentala 5, 11 Tallinn, Estonio.

FRAŬLINO aŭ virino kun serioza karaktero tuj serĉata por la gvidado de la marmstrumado de familio kun 5 maljunaj personoj. Mansfeld, Merseburg/Saale (Germ.), Wilhelmstr. 4.

KORESPONDO. F-ino Olga v. Calisto. Sparbersbachgasse 3/II, Graz, per leteroj kaj il. PK. kun ĉiuj landoj.

INTERŜANĜO. Miguel Bibas de Pina. Artileria Komandanto de la 10-a Regimento, Huesca (Hispanio), deziras interŝanĝi ĉiulandajn E-librojn, gazetojn, glumarkojn kaj aliajn E-aĵojn. Li disdonas belajn hisp. ilustr. revuojn kontraŭ ĉiuj libroj aŭ revuoj en franca, itala aŭ portugala lingvo (ankaŭ hispana lingvo de Ameriko) pri teatraĵoj, literaturo, amuzoj, fizika kulturo, naturismo, higieno ktp.

INTERŜANĜO. Poŝtkartojn interŝanĝas A. Villafranca, str. B. de Irigoyen, 1105, Buenos Aires (Argenti.). Mi akceptas nur po 100 malsamaj PM de ĉiu lando kaj sendas saman kvanton.

INTERŜANĜO. Sudelik Stanislaw, stacio Koluszki, Polio (Kongresawa), deziras interŝanĝi L, PK, PM kaj gazetojn, ĉiam respondos.

INTERŜANĜO. S-ro G. Bochechio, vicel. de UEA, Potenza (Italio), deziras interŝanĝi il. PK, naŭlingvajn il. ĵurnalojn kaj neuzitajn PM.

INTERŜANĜO. S-ro Ignat Wallner, Siempiergasse 8, Graz, interŝanĝas PM.

INTERŜANĜO KAJ KORESPONDO. Leono Funken, „Florinsmarkt 7a I, Koblenz (Germ.)“ deziras interŝanĝadon de helpa (milita) mono (sole biletoj) kaj vendon de sia kolektaĵo. Li ŝatus ankaŭ korespondadon per Angla kaj Franca lingvoj kun alilandaj ges-anoj, precipe bankistoj.

KOMERCISTOJ el ĉiuj landoj, kiuj deziras aĉeti francajn komercaĵojn kaj produktajn, turnu vin al s-ro Maurice Ladrière, 6, rue Auguste Chabrières, Paris 15-e (Franc.).

KORESPONDADON kun ĉiulandaj samaĵuloj deziras dekdu da 14-jaraj knaboj. Ĉiulandajn kolegojn mi petas bonvole sendi adresojn al: Klaso de knaboj, l.g. West-end-Lernejo, Worms a. Rhein (Germ.). — Fritz Pfaff, instruisto, del. UEA.

KORESPONDANTOJ. S-ro J. Mader, bei O. Parli, Raubergasse 3, Graz, serĉas korespondantojn en ĉiuj landoj por Porgazetara Esperanto-Servo.

KORESPONDO. S-ro H. Hammerschmidt, Plabutscher Schloß, Gösling bei Graz, kun sentadaj telegrafistoj ĉiulandaj.

KORESPONDO. Fraŭlinoj, anoj de gimnazio kaj komerc-lernejo, deziras korespondi per il. PK, kaj L kun gesamideanoj. Respondon ĉi ricevos. D-ro L. Györy Nagy, del. de UEA, Miskolc, Remenyin 4, Hungario.

KORESPONDO. S-ro Kaue Suuronen (tipografo), Helsinki (Finlando), Antinkatu 11, rp H, ovi 19, deziras korespondi kun ĉiuj landoj per L, PK, il. PK kaj gazetoj.

KORESPONDO. Francisko Pregel deziras interŝanĝi ĉiulandajn E-gazetojn; korespondas per PK il. bildflanke, ĉiam respondas. Adr.: Bydgoszcz-Bromberg, Podgórze 17, Polio.

KORESPONDO. Karel Poupeye, Dampoortstraat 21, Sint-Kruis (Brugge), West-Vlaanderen (Belgio), 19-jara tribunalficisto, korespondas L kun ges-anoj pri ilozofaj, social kaj politikaj temoj, PK kaj L kun fraŭlinoj pri ordinaraj temoj.

KORESPONDO. Pedro da Ressurreição, Policia Maritima, Lisboa (Portugalaĵo), deziras korespondi kun tutmondaj gesamideanoj — ĉiam respondos.

KORESPONDO. Simeon M. Simeonoff (dom Iv. Kristoff, fotografo), Plevne (Bulgario), interŝanĝas PK, PM, kaj korespondas precipe kun amerikaj samideanoj.

KORESPONDO. Samideano deziras korespondadon kun alilanduloj. A. Mausfeld, Hagen i. W. (Germ.), Arndst. 49.

KORESPONDO. Germanio, Chemnitz, Barbarossastr. 8, E. Klemm, sup. instruisto, petas negermanajn kolegojn elsendi bildkartojn de ilia lernejo. Mi respondos sammaniere.

KORESPONDO. Hellmuth Paul, Schwarzenberg (Germ.) deziras ricevi PM, kaj il. PK de ĉiuj landoj de la tero.

KORESPONDO. Ottomar Swoboda, Berlin W 57, Kanlersstr. 13, fraŭlo, 34-jara, deziras korespondi kun eksterlandanoj (speraj Esperantistoj).

PAC-AMIKOJ! Kontraŭ nian respond-kuponon mi sendos al vi Manifeston de nederlandaj kontraŭmilitaristoj. — G. P. de Bruin, Alleeweg 9, Enschede, Nederlando.

STENOGRAFIO. Esp.-korespondadon (karte kaj letere) en stenografio laŭ sistemo Gabelsberger-Schramm deziras Hans Flatters, Mainz (Germ.), Nackstr. 46, II.